

2019-07-14

### **Unua raporto de ILEI pri la 52-a Kongreso en Ĉaĉak, Serbio**

La kongreso komenciĝis. Ĝi gastas ĉe la teknika altlernejo de Ĉaĉak, kiu dependas de la universitato de Kragujevac.

Ni substreku la rekordan nombron de ĉeestantaj estraranoj: ses. Fakte mankas nur la vic-prezidanto Ivan COLLING el Brazilo.

La kongreso estas malgranda (kvindeko da partoprenantoj) sed ne malgrava. La Komitato kunsidis unuan fojon kun 26 validaj voĉoj, kun kvorumo je 23 voĉoj, do la Komitato estas decidpova.

La unua paŝo de tiu plej alta instanco de ILEI estis nomumi 2 personojn Honoraj Membroj:

Profesorino GONG Xiaofeng «Arko» el Ĉinio pro ŝia elstara laboro por la Ligo estante vic-prezidanto dum ses jaroj kaj kreskigante la ĉinan sekcion enorme. Plie «Arko» organizis la Konferencon de ILEI en Kunming en la jaro 2012.

La dua nova Honora Membro estas nia fidela József NÉMETH el Hungario, kiu akurate kaj efike redaktas nian organon *Internacia Pedagogia Revuo* jam de 25 jaroj.

La kongresanaro povas malkovri la belan regionon de Ĉaĉak, kiu entenas mirinde belajn naturajn kaj kulturajn lokojn.

Raportas la prezidanto Mireille GROSJEAN